Ĉineske

(VII)

e-Librigita de Elerno

dec. 2008

Busuanzi

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.

Ardo

Rememoro pri Rara Lampiro

per persona pen'
nia pionir'
sendis lumon de lampir'
kun persistaspir'.

fama veteran',
verda la lampir'
brilas ĉie kun admir',
restas la eskvir'.

Eto

Amo sen Formo

funebre pri s-ro Jiang Zuyue

al verd-afero
kun granda amo
vi flegis e-movadon
per zorga gamo

vi puŝis, tiris
kiel dinamo
sanktan entreprenon kun
via bonfamo
(09-01-2008)

Flamo sur Everesto

sur la plej alta
montpinto torĉflam'
olimpika bruliĝas
fine kun proklam':

ĉinoj elstaras
rokfirme kun am'
por okazigi feston
de monda sport-gam'.

Pekino, ĉinoj
varmaj, amikaj
bonvenigas venontojn
al olimpikaj

ludoj por kunĝu'
sur ter' fortika
spite al kalumnioj
diroj cinikaj
(08-05-2008)

Homara Varmo

homara varmo
de koro al kor'
penetre injektiĝas
per kompata bor'

homara varmo
senpreza trezor'
profunde gravuriĝas
ĉiam en memor'

Guozhu

Tutlanda Funebrado

(2008-05-19/21)

Duonhisata
nacia flago
memoras en tutlanda
funebra tago

pri la kruela
tertrema plago
bravismo en mizeroj
ekster imago

Lily

Printempa sopiro

el printempa sonĝ'
de ĝua amor'
mi kun malseka subo
sobris en langvor'

la ensonĝa hom'
kun penetra bor'
neviŝeblas neniam
el mia memor'

Fierinda Penseo

jam ducent fojojn
ni al ŝia glor'
verŝas sangon kaj ŝviton
kun granda fervor'

kiel monument'

ŝi en nia kor’
staras eterne firme
je ĉi festa hor’

(2008-06)

Maŭ Zedong (1893-1976)

Umefloro

Printemp’ alvenas
Kun neĝ’ leĝera
En glacio gracilas
vi flor’ fiera.

Ne vete pompas
herold’ vi vera.
Ĝis montfloroj buntas, vi
ridas espera.

esperantigis **Vejdo**

Sam

Hejmsopiro

Je juna aĝo
mia hejmsopir'
ŝajnis poŝtmarko eta
kun arda aspir'

de panjo kaj mi
je cola deŝir'.
Kiam mi adoltiĝis
mia hejmsopir'

estis ŝip-bilet'.
De mia edzin'
ĝi apartigis vere
kruele jen min.

En postaj tagoj
hejmve' kun inklin'
iris al la tomb' de Panj'.
Tero kovris ŝin

dum ekstere mi
staris mizere.
Sed la hejmsopiro nun
sternas infere

sin kiel markol'.
Vokas sufere
al la patrujo transe
mi ja sincere.

adaptita el "Hejmsopiro" de Yu Guangzhong

Vejdo

Ponto de Komunikado

Dediĉe al *Tra la Mondo**

verdajn mesaĝojn
en ĉina rondo
diligente dissemas
vi *Tra la Mondo*

kunligas ĉiujn
vi kiel ponto
komunikada vera
per korespondo

ĉe jara sojlo
mi kun florfrondo
deziru al vi ĉion
bonan en fronto

marŝu antaŭen
jen por renkonto
al fruktdona kaj brila
la horizonto

**dulingva populara revueto por ĉinaj esperantistoj.*

28-12-2007

Caisangzi

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

Sero

Omaĝe al Ĉinesko

floro en Esperantuj'
brile bela
stil-modela
kresku per forto ŝvela

ĉineskistoj strebu kun
pen' abela
ir' alcela
al estonteco hela

Vejdo

Neĝo en Sudo

flokeroj blankaj flirtas
malrapide
frosthumide
haste neatendite

surtere akvo flakas

grund-sordide
pike fride
kun penetro senvide

Chaitoufeng

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1*, 1* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bbxbBB kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

Sero

Perdita Amo

imvita

incita

amkuniĝo perdita

amo por

litlabor'

kaj korpgluiĝ'

kun pia kor'

for

for

for

ekscita

surlita

amludo forgesita

ĝojdolor’

en amor’

jam foriĝis

disde fervor’

sor

sor

sor

Changxiangsi

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 3, 3, 7, 5 silaboj kun kontinua rimado.

Sero

Perdita Amo

arda flam'
de ge-am'
vanuis tute jam
jen kun kora lam'

ama dram'
sen aklam'
finiĝis en trista gam'
kun vola malsam'

Zhuang Qixiong

Vivo en Sonĝo

Bona tag',
sona tag'

lunlumas ĉe eta lag’.
Ĉiuj en imag’!

Glora vag’,
plora vag’
vivas en songĝ’ kun verd-flag’.
Por ĉineska pag’!

Amantino

Suna dom’,
luna dom’,
tre freŝiga kun fantom’.
Kie logxas grom’?

Luva hom’,
pluva hom’
doloros pro glora nom’.
Ĉiuj en arom’!

Nostalgio

Monta voj’,
akva voj’,
kurba kaj kava al goj’.
Ĉu por nokta Troj’?

Venta boj’,

pluva boj’
rompis songon pri levkoj’
kun sopira ĝoj’.

Meditado en Aŭtuno

Milda vent’,
friska sent’,
krizantemo de lament’
en sunbrila pent’.

Lun-silent’,
Am-turment’,
ĉu por hejmena moment’
kun sekura tent’?

Al Patrino en Aŭtunmeza Festo

Sun-sopir’,
Lun-sopir’,
ĉu nostalgia dezir’?
Per ansera dir’!

Ond-suspir’,
mond-suspir’,
kun vagabonda akir’.
Por eksploda mir’!

Aŭtuno

Pluva pun’,
venta pun’,
por mielaj vortoj kun
sonĝa oportun’.

Nov- aŭtun’,
re- aŭtun’,
plej bona temp’-kora jun’,
nur sub frida lun’.

Al Kolegino

Dudekjar’,
kiel star’,
lerneja viv’ kun amar’.
Kie bon-najbar’?

Ama far’,
sen korbar’,
nur en sonĝ’ varma deklar’
per larma prepar’.

Komercista Novedzino

Sen leter’
en vesper’

jarfina, ŝi kun esper’,
ne por sinofer’.

Sola kver’,
kun sufer’,
nur ŝi en frosta veter'
larmas pro sincer’.

Chaozhongcuo

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respktive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xxa,xa (x=senrima).

Zhuang Qixiong

Riĉuloj

Tra l' mondo migras junkor'
kun pluva dolor'.
La riĉuloj remas
nur por gaja humor'.

Abunda ter',
blua ĉiel',
bela memor'.
En ebri' montriĝas
la pasinta honor'.

Daolianzi

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Zhuang Qixiong

Peniko

Per viva
penik-pent'
brilas la heroa sent'.
Bona kor' sonĝe skribas
ĉineskon kun glor-moment'.

Ĉielarko

En pluvo
de silent',
ĉielark' el orient'
kolorbrilas fiktive
kun viva indiferent'.

Dianjiangchun

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)

Lily

Seksallogaj Lipoj

kiel forto

viaj lipoj invita

kaj incita

logas ekscita

kiso varma

al mi alglita

revigas

ĉionspita

al lud' enlita

Dielianhua

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)

Vejdo

Omaĝe al Kara Tikos

je lia Centjara Naskiĝtago

1.

ĉihore volas kun am'
mi omaĝi
versojn de deklam'
al vi, movada dinam'
pro via laŭdata fam'

vi honesta sen ornam'
restis nur por
nia movad' jam
kvankam sola sen team'
vi nutris ĝin per fajr-flam'

2.

ankoraŭ mi en memor'
tenas bildon
de via labor'
pena kun arda fervor'

por movada brila glor’

ho, nia kara sinjor’
ni ja ĵuras
decideme por
daŭrigo de via vol’
fidela kun verda kor’

Frue Velkinta Floro

ankoraŭ naiva flor’
freŝe juna
kun kristala kor’
sub vetera malignor’
kaj ĝardenista favor’

eĉ velkis dum eta hor’
nekonscie
sen ajn pompa glor’
sub bat’ de roka rigor’
en feroca tertrem-vor’

(16-05-2008)

Fengrusong

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xx (x=senrima)

Lily

La Prelud' Koita

en amorludo lita
li malrapida
reagas je l' avido
seksĝua
ekscitita
unue li suĉas
per buŝo vizita

de mamo iras glita
la buŝ' incita
ĝis mia suba truo
suĉ! suĉ! ekmov' subita
kirlas lango supla jen
la prelud' koita

Olivarbo en Sonĝo

vagabonde kun tristkor'

mi vagadas por

fluganta bird’ en ĉiel’

lazura

por bunta flor’

kreskanta en montval’

sen velkiĝ’ nek langvor’

por roj’ kun tinta sonor’

mi vagadas for

por serĉi olivarbon

en mia dolĉa sonĝhor’

longe neviŝebla

el de mia memor’

Haoshijin

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)

Guozhu

Al Penseo

(2007-12-09)

Jen speciala
ĉineska numero
de Penseo! Nova
rekord-apero.

Jubilu: "Proksimiĝas
bona afero!"
kaj gratulas ĝin al
plena prospero!

Hexinlang

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 5,344,76,7,78,33 / 7,344,76,34,78,33 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xxa,xa,a,xa,xa / a,xxa,xa,xa,xa,xa (x=senrima)

Zhuang Qixiong

Omaĝe al Zamenhofa Festo

Kun emocio
ni festu
grandan tagon
laŭ racio.
La talenta Zamenhof
----lingva utopio?
Per paca ambicio;
Por homara frateco
kaj socia harmonio.
Plej glora
defio!

La poeta genio
instigos
nin al nova
historio.

Kreu la riĉajn verkojn
en ĉineska krio
laŭ tempa
melodio!
Skribu la artikolojn
kun anima energio
kaj brila
magio!

Huanxisha

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj po tri versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo aaa / xaa (x=senrima)

Ardo

Jarfine

Alternis la sezonoj
jam pasis jar' sen tono
mi vivas sen la krono

Novjaro baldaŭ venos
mi volos fari bonon
sed ĉasos sen redonon

Jiangnanchun

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Eto

Vintro en Strateto

malseka

kotplena

vojeto ŝtona

sen bru' promena

sub malforta sunlumo

oblikve lante trena

eksonis

paŝbruo

sole pasanta

fale kun skuo

rapide revenhejma

por varmalita ĝuo

Jianzi Mulanhua

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimado.

Maŭ Zedong (1893-1976)

Sur la Vojo al Guangchang

Neĝa ĉiel'
Spronas nin marŝi al cel'.
Sur la montar'
Flagoj flirtas en ventmar'.

Kien nun ni?
Al Gangjiang en neĝa sin'.
Venis ordon',
ekas arme' en impon'.

elĉinigis Vejdo

Linjiangxian

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 66,7,55 laŭ rimaranĝo xa,a,xa (x=senrima)

Zhuang Qixiong

Bambua Maro en Yixing

Akv' kantas en kurbroj',
vent' bruas en flosmont'.
Ĉiuj verdas kun renkont'.
Kiel ĝentilul',
tre ĉarmeca font'!

Sovaĝbirdoj pepas,
herboj floras ĉe pont'.
Poetoj ruĝis de hont.
La serpenta pad'
plendu pri rakont'!

Manjianghong

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x = senrima)

Vejdo

Ĉinesko Prosperu!

en ĝarden' de
verdujo
ĉineska flor'
el burĝon'
sane kreskas
post priesplor'
tridek-kvar-jara pena
kaj diligenta labor'
ni fine
vidas rikolton
jen en glor'

ĉinesko—
la trezor'
de parnas'
per valor'
kreas kulturon
de verka mor'

por ĝiaj disvolviĝo
kaj populara furor'
ni ĉiuj
kune klopodu
kun fervor'

14-11-2007

Panegiro al Olimpikaj Ludoj en Pekino

amikoj el

Azio

Ameriko

Eŭropo

Aŭstralio

kaj Afriko

konverĝas en Pekino

por vervaj Olimpikoj

kun amo

kun amikeca

fortiko

per sporta

apliko

ni kune

amikoj

konstruu pacon

sen ciniko

la mondo sin trovu en

komprena komuniko

kun paca

kaj harmonia

publiko

05-aŭg.-2008

Mantingfang

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj de 446,45,634,345 / 2,344,54,634,345 silaboj laŭ rimaranĝo de xxa,xa,xxa,xxa/ a,xxa, xa,xxa,xxa (x=senrima).

Guozhu

Ĉin(esk)oj Venas!

Antaŭ pli ol
dudek jaroj,
aŭdiĝas ĝojkrio
de UEA
kun emocio:
Hura! Ĉinoj venas!
kun freŝa
energio.
Rekordo
fierinda
en historio.

Tio
aŭdiĝas
nun en nova

melodio:
Ĉineskoj venas
en gracio!
Pli belas ĝardeno
de verda
poezio.
Antaŭen!
Nin alvokas
nobla misio!

(2007-12-09)

Niannujiao

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)

Guozhu

JARKUNVENO de HEA 2008

Jarfine en
decembro
sub Zamenhof-beno,
laŭkutime
okazis
nia jarkunveno.
La Espero.
Verda flago.
Raport-bulteno.
Kunfotiĝo
en festa soleno.

Daŭrigo plezura.
Al Ruĝa Klifo
je fampleno!
Granda halo:
Du Odoj!
Poezia sceno.

Pli allogas
kultura ĝuo
ol festeno.
Je disiĝo
sopir' pri reveno!

Maŭ Zedong (1893-1976)

Kunlun-Mont'

Tra la ĉiel'
Kunlun-Mont'
super tuta naci',
kiel jadblanka drako
fridigas per glaci'.
Fandigas sun',
akv' troŝvelas
inundas sen pi'.
Kian kulpon
aŭ bonon havas ĝi?

Mi diru al Kunlun:

Nek tro altu

Nek fridigu vi.

Mi distranĉu vin per spad'

En samajn pecojn tri:

Po unu en

Eŭrop', Uson'

restu kaj Ĉini'.

Paca mondo

vivu en harmoni'.

esperantigis **Vejdo**

Pozhenzi

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)

Zhuang Qixiong

Patrino

La patrinaj larmoj
perlis el okuloj.
La konstantan hejmveon
tredis ĝi en nebuloj.
Miaj speguloj!

La patrinaj sulkoj
larĝis pro postuloj.
Tempo,kiel riveret',
disfluis kun orbuloj.
Bonaj gratuloj!

Pusaman

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimado

Maŭ Zedong (1893-1976)

Dabodi

L' arkon buntan de ĉiel'
kiu svingadas por bel'?
Sub postpluva sun'
verdas mont' en jun'.

Batal' en vilaĝ'—
kugl-trua pejzaĝ'
monton ornamas,
ĝi des pli ĉarmas.

Esperantigis **Vejdo**

Vejdo

Zigzaga Montvojo

kvazaŭ smeralda ruband'

ĝi spiralas al bluland'

tra densa nebul'

en flosa nublul’

grimpanto vera
kun volo fera
marŝadas pene
ĝis pint’ senĝene

Qinyuanchun

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 13 versoj de 444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ rimaranĝo xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxa,xxa,xxa (x = senrima)

Maŭ Zedong (1893-1976)

Neĝo

En nordlando
neĝas vaste
ŝlosas glaci'.
Cis kaj trans Mureg'
kovras blanko.
Haltas torent'
sen energi'.
Montserpentoj
elefantoj
vaksaj altas kun pasi'.
Sub sunlum'
ĉi' en ruĝa vest'
ĉarmas des pli.

Antaŭ pejzaĝmagi'
bravuloj
falus kun vekri';
imperiestroj

hontus en stil’
aŭ lamentus
pri verk-graci’;
kaj fiera
Ĉengis-Ĥano
nur lertus en pafmeti’.
Ĉiuj for!
Veraj herooj
nun inter ni.

Elĉinigis Vejdo

Changsha

en aŭtunfrost’

ĉe insulet’

alnorda flu’

ruĝe farbitaj

dekmil montoj

jada river’

veloj sur blu’

agloj ŝvebas

fiŝoj naĝas

jen strebe al liberĝu’

en vastaĵ'

kiu ja regas

jen mia ĉu'

ope por rendevu'

ni venis

en temposinu'

ni kunlernantoj

junaj, vervaj

seriozaj

sen ambigu'

kaj kritikis

kaj komentis

pri ranguloj de enu'

en memor'

ni naĝe pelis

barkojn per sku'

elĉinigis Vejdo

Vejdo

Nacia Funebrado

ĉe solena
kaj malĝoja
korŝira hor'
la tuta lando
en silento
tri minutojn
kun trista kor'
funebris pri
la mortintoj
en tertremo de homvor'
sirenoj
longe fajfadis
en peza ĥor'

nacia flag' de glor'
flirtadis
en dolor-langvor'
ĉe duonmasto
dum ĉi-moment'
senmoviĝis
kiel marmor'
ĉi' vivanta
ho, gefratoj
vi trankvile iru for

ni ĉiam
tenas vin bone
en la memor'
(19-05-08)

William Butler Yeats (1869-1939)

Kiam Vi Oldos

I.

kiam oldos
vi grizeta
kun dormem-plen'
kapklinemante
ĉe la fajro
ĉi libreton
per la manpren'
legu lante
kaj prisonĝu
la intan rigardon sen
malĝojo
kaj densajn ombrojn
profundajn en

via okuleden'
kiom da
homoj sen ajn ĝen'
ŝatis momentojn

de gracila
via ĝojad'
kaj la bonven'
ŝatis vian
belon aŭ el
vera koro kun kompren'
aŭ el sent'
hipokrita kun
malvera ben'

II.

sed nur unu
en la mondo
fortika vir'
amis animon
pilgrimantan
vian kun pi'
kaj kun admir'
amis ĝenon
kaj ĉagrenon
sur viaj vangoj de bril'
ŝanĝemaj
ĉiam plenplenaj
je viv-aspir'

Kaj kapklinu sen dir'
murmure
kun eta suspir'

ĉe flamanta fajr’
kiel Amo
fuĝis foren
sen manakir’
en la montojn
superkapajn
kaj kaŝis sin kiel glir’
inter grup’
da steloj brilaj
sen ajna spir’
elangligis **Vejdo**

Rumengling

ĉina fiksforma poemo el 7 versoj de 6,6,56,2,2,6 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,a,a. La kvina kaj sesa versoj estas samaj.

Avĉjo

En Sonĝo

Rosojn sorbis pistil',
Rozon sorĉis pist-il',
diboĉi tranokte
Korpi fandiĝas sub vir'
Kor-tril'
Kor-tril'
Bis en sonĝa zefir'

Eto

Falanta Folio en Vento

la falanta foli'

drivas el famili'

l' arba forvage

en venta melodi'

sen sci'

sen sci’

pri la onta medi’

Zhuang Qixiong

Korta Nokto

Densa vin’,pura te’.
Birdoj pepas kun ve’.
Lun’ en Mezaŭtun’,
nur por senta obe’.
Ide’,
ide’
bona ja post pere’!

Ebrio

Ĉinesko ebria,
kiel anim’ dia.
Ĉiuj amikoj,
kun interes’ pia.
Scia,
scia
sprit’, ĉiam glacia.

Festo de Duobla Naŭo

Antikve senis sent’,
re en Festa moment’.
Sur mont’ al foren,
kun izola prudent’.
Lament’,
lament’,
vin’ pli varma ol vent’!

Shaonianyou

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,5,445 /75,445 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa (x= senrima)

Guozhu

Infanoj de Huangshi

(2008-03-31)

Nin kaptas sensacio,
kaj emocio,
pro la filma
premiera
ceremonio
de <Infanoj de Huangshi>.
Ne pri fikcio.
Sed kortuŝa
aventuro
en historio.

Shengshengman

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x = senrima)

Lily

Langa Kiso

ĉe gea hor'
lia langо
sin ŝovas kiel bor'
en mian buŝon kun
ŝmaca sonor'
ĝi kirlas kaj serĉas
leĝere
sen ajn pudor'
leketas
malseke
la mian kun fervor'

lia langa esplor’

provokas

min forte al amor’

varma saliv’

fluas kiel motor’

lanĉas am-diboĉon

glukorpan

tordiĝa ĥor’

nin ĵetas

en amludon sen langvor’

Shiliuziling

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Ardo

Iom el Miaj Pensoj

sun'
kun nuanca brilo nun'
enpaŝas
sur sankta tribun'

lun'
intersekvas sin la sun'
inkubo
gvidis min al dun'

stel'
pensaj fajroj sur ĉiel'
vaganto
paŝas en sencel'

spac'
vasta kora la palac'
tutplenas
penso de aŭdac'

Eto

Fantazi’ de Juna Melkistino

Kun
lakt-pot’ surkape ŝi nun
revenas
sub ruĝhela sun’.

Ŝvit’
perlas survange per glit’
fantazi’
venas por vizit’.

“Se
mi vendos lakton, por ke
aĉetu
ovojn ĉipe tre.

En
estont’ naskiĝos en ben’
kokidoj
en grandkvanta ĉen’.

Mi
forvendos ilin je pli
alta prez’
en festo feri’.

Nu
mi havos monon por ĝu'
aĉeta
de jupo kaj ŝu'.

Al
mi proksimiĝos en bal'
junuloj
pro nova vestar'."

Sen
konscio ŝi skuas jen
la kapon
dum sia promen'.

Bum!
Falas poto kiel plumb'
de l' kapo
kaj rulas sur grund'

Tut'
da lakto kovras per ŝut'
la teron
sen restanta gut'

For
ŝia ensonĝa trezor'

seniĝas
en ŝia ĝemplor’.

Laŭdo al Tikos*

Vi
je verda ambici’
senhalte
semis kun mani’.

Vi
silkraŭpo kun energi’
penege
retteksis kun pi’.

Vi
kandel’ en mallum-medi’
spiteme
brulas per radi’.

Vi
ĝardenisto kun magi’
plantidojn
flegis kun konsci’.

Vi
kontraŭ frida ironi’
eltenis

jen kun apati’

Vi
verda stelo kun lumstri’
prilumas
nin kun emoci’.

Vi
saĝa bravul’ kun pasi’
nin spronas
jun-generaci’

*Tikos (1907-1983): ĉina fama esperantisto, kiu, en malfacila situacio, organizis Esperantajn aktivadojn: establi korespondan lernejon de Esperanto, helpi fondi lokajn Esperantajn lokajn sociojn kaj kuraĝigi junajn esperantistojn al plua lernado. Li estas amata kaj respektata de ĉinaj herbradikaj esperantistoj, kiuj honore nomis lin “torĉtenanto de ĉina e-movado”.

Freneza Tertremo

ter’
tremas ege kun sufer’
hom-mondo
ŝajnas en infer’

Per

Malicaj ungoj de fer'
Ĝi falĉas
Homojn en mizer'

dom'
falas en faŭkon de gnom'
nenio
fuĝas el pogrom'

nom'
glora kaj vanta renom'
nur estas
ĝia bongusta pom'

tim'
taŭgas por ceda pilgrim'
batalu
por nia viktim'

(okaze de granda tertremo de Sichuan-Provinco, 14-05-08)

Montoj

mont'
sinuas al horizont'
en nebul'
kiel arka pont'

mont’
torentas kiel marond’
disflue
el junverda font’

mont’
elkreskas sur roka fond’
spite al
tempesta renkont’

Mandio

Preleg’ de Profesoro

Sur
podio granda figur’
prelegas
kun blufa mezur’.

En
aŭskultantoj dorma sven’
paŝadas
per ĝoja promen’.

Ĉe

angulo sonas ĉen’ de
ronkado
laŭtiĝante tre.

De
aliflanke re kaj re
babilo
zumas sen obe’

Ĉar
la prelego sen prepar’
sengustas
je tempa malŝpar’.

Ho
aŭskultantoj plendas pro
enuo
de la orator’.

Maŭ Zedong (1893-1976)

Tri Poemetoj

Mont’
rajdvipas mi kun volont’.
Kapturne,
jam ĝis ĉielfront’.

Mont’

kiel ruliĝanta ond’,
impetas
en batala rond’.

Mont’
enpikas en horizont’,
jen kvazaŭ
volb-subtenanta fond’
elĉinigis Vejdo

Niuniu

Stulta Hokfiŝisto

Jen
li ekĵetis per faden’
logaĵon
ĉe bord’ de haven’.

Li
atendis kun fatazi’
akiri
fiŝegojn dek tri.

Kun
korbrulo li sidas nun
sub arde
la bakanta sun’.

De
temp’ al temp’ li ĉesis ne
trinketi
el la kruĉ’ de te’.

Ĉi
momente fulmis radi’
sur akvo
kun ŝajna premi’.

Bu’
faletis laŭ akvoflu’
iome
kun vezika bru’.

Li
ektiris kun energi’
la stangon
kun mallaŭta kri’.

Ba
li elhokis bulon da
retaĵo
de fiŝisto ja.

Por
la dua fojo pli for
li ĵetis

kun sama fervor’.

Dek
minutojn poste bu’ ek
moviĝis
re kun akvovek’.

Li
pensis, se moviĝos ĝi
refoje
nu ektiros mi.

Ja
vere li resentis tra
fadeno
removiĝon, ha!

Per
fortostreĉ’ li kun esper’
ektiris
ĝin al la ter’.

Fi
kia granda ironi’
ĝi estis
nova tragedi’.

Hom’

starante ĉe gardodom'
ekkriis
per kara pronom'.

"Hej
ci amiko, ĉirkaŭej'
jam estas
polucita plej.

Vid'
al la tabulo en sid'!
Ĝi diras
'Instanca decid':

Ĉi
loke pro akv-poluci'
ne licas
fiŝada meti'."

Sam

Antaŭen, Niaj S-anoj!

gratulon al la 7-a Ĉina Esperanto-Kongreso

flag'
verda en aŭtuna tag'
ekflirtos
sen ajna imag'

son’
ovacio en impon’
aŭdiĝos
en suda Kanton’

jen
ni por kongresa alven’
pretigu
nin al entrepren’

jam
cent jarojn verda team’
klopodas
per pena dinam’

je
la solena hor’ l’ arme’
ĵuros per
interna ide’

sent’
nova en tiu moment’
traflugu
ĝis la firmament’

vok’
forta premu super mok’

kaŝanta
en malluma lok’

por
Zamenhofa plia glor’
ni marŝu
kun granda fervor’

Sero

Grimpado al Monto

de
komence ni kredis, ke
grimpado
’stas facila tre

sed
tuj ĉe montega pied’
ni pensis
pri taŭga rimed’

en
unua tempo ĉagren’
nin premis
per vojmaleben’

post

horo doloras ĝis ost'
talio
je fortstreĉa kost'

ŝvit'
fluetis sen ajn hezit'
tutkorpe
je nia irit'

spir'
nia pezis por dezir'
ripozi
en monta zefir'

jam
senfortis kun krura lam'
je ascend'
ve, nia team'

Vejdo

Funebre pri S-ro Jiang Zuyue

Ve
Pene por verda ide'
Silente
Ja klopodis tre.

Ve
Vi soldato el arme'
Batali
Jam povis plu ne

Ve
Ni ĵuru solene je
Via vol'
Por pli granda kre'

Brila Stelo Falas

funebre pri la forpaso de Claude Piron

stel'
brila falas el ĉiel'
subite
plumbe sen ŝancel'

for
la gigant' de verda glor'
forpasis
en ĉi grava hor'

ve
al ni, heroa pere'
nin spronas
per intern-ide'

vi
foriris el famili'
sed restas
via lumradi'

Porpaca Soldato

dediĉe al SAT

SAT

brava porpaca soldat'

elstaras

en plej bona stat'

SAT

vera laborista frat'

penegas

por ties beat'

SAT

esperanta advokat'

la sulkon

fosadas kun ŝat’

Zhuang Qixiong

Kapro

Glor’
bona, simbol’ de favor’;
Sub ĉiel’
sunronĝas kun mor’.

Klin’
de bonkor’,vera obstin’;
En Kristnask’,
frand’ al lupavin’.

Kor’
de ĉiamverd’,en aŭror’;
Herbetoj
ja kiel trezor’.

Nubo

Bul’
arbitre flirtas kun tul’
en ĉiel’,
nur por intimul’.

Kor’
klara vagas pro dolor’.
La natur’
verdiĝas en plor’.

Sent’
tutpura dancas en vent’.
Ama viv’
restos kun talent’!

Al Instruisto

Ben’
multiĝos laŭ taga pen’.
Ne pentu
pri sia posten’!

Ora Aŭtuno

1

Or’
de ter’,sub nuba kolor’,
tre riĉaj
fruktoj en homkor’.

2

Glor’

de ter'--en pluva flavflor'.
Solanser'
gakas kun dolor'.

3

Plor'
de herboj--en lagaŭror'.
Ardeoj
mire flugas for.

Shuidiaogetou

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x = senrima)

Vejdo

Flirtanta Verda Flago

Okaze de Z-Festo 2008

jam ne en sonĝo

nia afero

koketis pompe per

bela ekstero

verda flago flirtas

impone inspire

jen kun espero

kaj kuraĝigo

sur vasta tero

jam tempo

alvenas

en vero

por atingi

la celon de prospero

la tutmond-verdiga

de majstro Zamehof

nun kun fiero

antaŭen marŝu

trans bariero

Shuilongyin

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de 67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x= senrima)

Lily

Kac-sucado

manfrotad' de l' sucul'

faras kacon rigida

ŝia langO

ŝmace lekas

per rapida

ronda movad'

de kackapo

piramida

ĝis pufaj ovoj

jam la ilo

fariĝas

humida

ŝia buŝ' incita

mordetas

per avida

amdeziro

ĝin kaj glitas

mov' senbrida

lek' senĉesa

jam lasas ĝin

sku-trepida

jen li nun pretas

eniri ŝin

seks-memfida

Siyuanren

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvin versoj de 75, 445 / 7,5,545 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xa,xxa / a, a, xxa (x=senrima).

Guozhu

Ĉina <Listo de Schindler>

（2008－03－31）

Kiel <Listo de Schindler>:
Devo de viro!
Raportisto
en milito.
Nobla inspiro.

Mil lioj da trans-iro.
Venko-akiro.
Sur momumento
ĝis hodiaŭ
kor-panegiro!

Sumuzhe

ĉinaj fiksforma poemo el du strofoj po 7 versoj de 33, 45, 7,45 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a,xa (x= senrima)

Eto

Fiŝoj en Akvario

kaptita

fiŝaro

naĝas triste

en akva klaro

sed kvazaŭ en koŝmaro

limigita

pro spaca ŝparo

senfina

amaro

ilin ĝenas

per ronda baro

pro homara bizaro

jen sopiras

ili al maro

Suzhongqing

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)

Vejdo

Sendorma Nokto

en koro brulas la flam'
sendormas mi jam
turniĝante ade
pro perdita am'

malvera
vort-ornam'
mava dram'
jam foriĝis
oh, vanuis
falsa proklam'

Taoyuan Yiguren

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 7,6,6,5 kun kontinua rimado

Vejdo

Funebre pri Io Chou*

bela granda papili'
falas sen energi'
malsupren pli kaj pli
teren sen vekri'

ankoraŭ kun emoci'
transmonde pene vi
jen okupiĝas pri
entomologi'

*Io Chou, ĉina fama entomologo, esperantistiĝis en 1926.

Tiaoxiaoling

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Guozu

Struto

Struto, struto,
mokinda konduto.
Kapon malsincere
kasxas gxi subtere.
Rete, rete,
malkovri komplete.

Misa Komedio

Fama, fama
malĉastej' reklama,
sur kovrilo loki,
vekas homojn moki.
Kio, kio?
Misa komedio.

* En la speciala n-ro pri Ĉinio de sia organo, la prestiĝa Instituto Max Planck en Germanio(Max Planck Institute)

publikigis sur kovrilo vicojn da ĉinaj ideogramoj kiuj aspektas kvazaŭ antikva ĉina poemo，tamen fakte estas reklamo de malĉastejo en Aomen (Makao). Tio vekis malkontenton de legantoj. Post malkaŝiĝo de la evento, redakcio de la nomita revuo dronis en embarasa sinĝeno kaj ankaŭ la Institulo sentas grandan bedaŭron.
--- laŭ TTT-retejo Ĉina Novaĵo. 2008-12-10.

Miĉino

Malĉipa Pugo

(2007-12-05)

Pugo, pugo,
eĉ en ofic-flugo
ankaŭ rangojn havi
ne forgesis pavi.
Vipa, vipa
draŝ' al luks' malĉipa.

Vejdo

Drakboata Festo

Remu, remu
Ne deflanken tremu.

Per kuniĝa peno
ĝis fincela veno.
Nove, nove,
glate ĉionpove.

(08-06-2008)

Yanke

Sinceran Gratulon al Okazigo de l' 1-a

Seminario pri Ĉineskoj

poem', poem'
ĉinstila — vera gem'
pompas kun fort-havo
post zorga pluv-lavo
vola, vola
al posed' popola

Wanghaichao

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 14 versoj de 446, 446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x = senrima)

Lily

Novnaskito en Tertremo

I.

en utero
mi jam aŭdis
bruegon de ekster'
mi tuj sentis
manan premon
de patrin' pro mizer'
kaj tuja danĝer'
ni glite falis
kun malleĝer'
mi anhelis
pro mank' de freŝa aer'

panjo en malesper'
ĝemis panike
kun larmriver'
varma sango
ŝia fluis

jen ĉirkaŭ mia ĉel'
falis pro l' mister'
ŝi dorsen frape
kun korp' sur ter'
povra panj', ĉu
ni troviĝas en infer'?

II.

pasis tago
panjo kuŝis
mute preskaŭ sen spir'
nun jen kaj jen
mi ja aŭdis
ŝin kun kava suspir'
vole je aspir'
al surtera viv'
mi kun sopir'
el uter' tuj
akuŝiĝos por elir'

panjo en delir'
parolaĉis, ve
kiel rapir'
tio pikis
mian koron
subite forta tir'
verŝajne de vir'
prenis min elen

kun eka ŝir’
mi naskiĝis
aŭte sub gapoj de mir’

Xiangjianhuan

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimaranĝo aaa / bb,aa

Guozhu

La Unua Seminario pri Ĉinesko

Solenejo hela
kaj bela.
Kunsido sub flago verdstela.

Kun koro,
adoro
fidela,
nova marŝo sub gvido cela.

(2007-12-09)

Zhuang Qixiong

Al Estimata Prof. D-ro Geraldo

Kun kortusxa sento
kaj tento,
trinku pro via lingv-talento!

Bonkreska,
ĉineska
torento
certe disfluos en silento!

Xijiangyue

ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 66,7,6 silaboj, laŭ rimarangĝo xa,a,a (x=senrima)

Zhuang Qixiong

Lotusfolio

Kiel flughavenon
ĝin rigardis libel':
libere fali sur rel'
kaj aera kastel'.

Knabino portis ĝin
kiel verda ombrel':
friske ludi kun miel'
en varmrga somer'.

Yexingchuan

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

Cindy Mckee

Al Sinjoro Vento

subite ŝtormo pasas
de nordo
kiu blovas
freŝa vento
sen kolero
ŝtormoj ĉiam pasas
kapablaj sentoj fluas
nur homo
fulm' estingas
homa vento
kun espero
stelojn sunon portas

Imre Szabo

Sentitole

(1)

grizajn nubojn ekpelas
aŭtuno
ventoj ŝvelas
en la foro
eta arbo
esperon ribelas

mi neniam koleras
neniam
mi koleras
per memoro
vin mi verdas
obstino nur veras

(2)
Tra nokta ŝipvojaĝo
ĉeestis
stelobraĝo,
lunvualo
akvonigre
lulis mola naĝo

ekvibris malkuraĝo
por montri
sin kuraĝo
mi vin tuŝis
mi vin gajnis
en tiu vojaĝo

Vejdo

Al s-ro Imre Szabo

hej, poeto abela
hungara
altnivela
donas al ni
ĉineskversojn
kun pejzaĝ' fabela

poemo via bela
priskribas
per lumhela
zorga tuĉo
versimilon
de kreaĵ' ĉiela

Yijianmei

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,44,744 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

Sam

Umefloro en Vazo

frondo kun umefloro

en la vaz' de

ruĝkoloro

oblikve sin apogas

deprimite

en angoro

disde l' neĝa rigoro

ĝi perdiĝas

en malgloro

en varma vaz' tuj velkos

ĝi povrinda

en doloro

Yijiangnan

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo de xa,xa,a (x=senrima).

Hosemo

Belulino kaj Vino

Belulin',
Kiel dolĉa vin'.
Malfermiĝu mia sin'.
Tiom mi soifas vin.
Ĉu de am-destin'?

Sam

Silkraŭpo

silkraŭpo

laboras pene

ŝpinas kokonon majstre

vomadas silkon ene

ĝismorte plene

William Butler Yeats (1869-1939)

Kiam Vi Oldos

kiam vi
oldos en futur'
plenplena je grizo kaj
dormemo sen ajn plezur'
kapklinate nur

ĉe fajro
legu bonvole
ĉi libron de poemar'
lante kaj senparole
legu senfole

prisonĝu
ekrigardojn de
via pasinteco kaj
profundan ombraron ĉe
la okulmuze'

prisonĝu
kiom da homoj
ŝatis gracilajn movojn
viajn kaj kun sindonoj
kaj kun korbonoj

kaj ŝatis
vian belon jam
ĉu el hipokrita mav'
aŭ el la korfunda am'
kun softa aklam'

sed estis
unu sola vir'
li amis pilgriman en
vi animon kun sopir'
kaj ama aspir'

li arde
amis elkore
la ĉagrenojn de via
vangoj ŝanĝemaj hore
kvazaŭ aktore

klinu sin
ĉe fajro pie
murmuru kun pentdolor'
ke fuĝis amo strie
kaj senkonscie

en montojn
kaj kaŝis ŝtele
sian ĉarman vizaĝon
inter steloj malhele

flagraj ŝancele

elangligis Vejdo

Zhuang Qixiong

Memfido

1

Do kial
indiferenta?
En malsato kaj frido;
en hardado pluv-venta.
Ĉu eminenta?

2

Mizero—
la ofta afer'!
Ni ne dronu en vino
sed vivu en verd-esper'.
Al nova prosper'!

Yiwangsun

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 7,7,7,3,7 kun kontinua rimado

Zhuang Qixiong

Deodaro

Prujna arbo kun rigor’,
Verdaj branĉoj en dolor’.
Per frostventa bonodor’,
por honor’.
Kiel bela rememor’!

Nokte Legi Libron 《Jŭejang-turo》

Jarmila material’,
kiel bonmanĝa regal’,
kun estimata signal’.
Ho, kial?
Jen hero’ en degradval’!

Yugezi

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 7,7,33,7, silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a (x=senrima)

Sero

Mia Ombro

l' ombro — duono mia

malhela kaj glacia

nur vivas

memscia

en obskuro opia

Yulinling

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive kun 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x=senrima)

Lily

Embaraso en Buso

per veturo
kuras buso
kun plezuro
pasaĝeroj skuas
korp' al korpo
la murmuro
tradenta eksonis
kvazaŭ amĵuro
subite
mi eksentis
jen ĉe mia femuro

tuŝon de kaca duro
brulantan
de virfiguro
ekis froto supren
malsupren

sen mezuro
varma ĵeto
suka
defluis laŭ l’ kruro
hasteme
mi min turnis
ba! blanka ĉuro

Yumeiren

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimado.

Guozhu

Al Arka

Arka faris diskurson,
kaj fondis kurson.
Samideanoj laŭdas,
sed maliculoj malaplaŭdas.

Ĉiam aperas fuŝo,
el hunda buŝo.
Proverba leciono:
Al fripono trafu bastono!

Zhuang Qixiong

Maŭ Zedong

I.
—laŭ ĉinesko Chaozhongcuo

Kun grandioza stilo
kaj sankta brilo
Vi skribis poemojn
per ritma fusilo

Dekmil lia
Longa Marŝo—
dolĉa trilo
Montoj kaj riveroj
kantis de jubilo.

II.
—laŭ ĉinesko Taoyuan Yiguren

Kun strategiista ŝtal'
mediti pri batal';
Sur dorso de eval'

marŝi en rival'.

Bonodori flav-petal'
kun aparta signal',
kiel sanga sunfal'—
plej bela regal'.

III.
—laŭ ĉinesko Dielianhua

Vi iam fumis ĝoje
kaj rigardis
supren levkape
al anser' sovaĝa tre
suden kun brila ide'.

Sed torentis rivere
en vasta mens'
kiel nova kre'.
ŝtorm' sin levu subite.
por ver-heroa trofe'!

IV.
—laŭ ĉinesko Shanhuazi

Vi en neĝa vilaĝo
al nord-landa pejzaĝo
senbride revis pri la
vojaĝo.

Pensoj flirtis en ĉiel'
kun poezia saĝo
per genimilitista
kuraĝo.

V.
—laŭ ĉinesko Renyueyuan

Por instigi junulojn
pri mensa konstru'
Vi sentime
frapis akvon
en la mezflu'.

Pene provi
sin en ondoj--
plej bona ĝu';
Brave krei
nov-ĉielon—
vera instru'!

VI.
—laŭ ĉinesko Haoshijin

Vi ŝparis tempon
eĉ nur unu moment'.
Vi verkis poemojn
kiel monument'.

Vi kreis novan vojon
en duonjarcent'.
Vi paŭsis grand-planon
per zorga ferment'.

VII.
—laŭ ĉinesko Xiechichun

Vi prosperis
per poeta inspir'
en kanjon'
de antaŭdir'
pri glata lag'
ĝis Diina mir'
kun nobla,
granda aspir'.

Romantika,
magia pionir'
restis en
nia sopir'.

Sentima bel’—
sento de akir’.
Plezuroj—
ne plu vespir’!

VIII.
—laŭ ĉinesko Heshengchao

Vi deklamis en silent’,
kun plena talent’,
la frazon sur pordego
per kora torent’.

Ni stariĝis
pro eminent’.
La glora moment’
sonoris kaj brilis al
monda orient’!